

ESPERANTO - BULTENO DE POLLANDO

Jaro dua. Nr. 1 /4/ kaj lasta

Aperas monate

Warszawa, Junio 1946 j.

Ne ekzistas forto, kiu povus venki kaj subjugi la dudekmilionan nacion, per ligilo de komuna libereco kunligitan.

El Manifesto de la Pola Demokratia Asocio /1836/

Al la memoro de niaj mortintaj.

La horlogo de eterneco elsonis novan horon kaj eksilentis la kanonoj-venkis la justecol

En tuta mondo oni rekomencis laboron por la paca vivo, farante kalkulon da perdoj.

Ankau Polujo revenas al la nova libera vivo post preskau sesjara peza germana okupado, forpreninta ses milionojn da viktimoj.

Kaj kune kun civitanoj de la renovigita Polujo ankau ni, esperantistoj, havantaj la bonsancon travivi la terurajojn de la milito, aperas sur la publika forumo por alporti niajn brikojn al konstruo de la nova, plej bela mondo.

Sed tre malmultaj kaj malvastaj estas niaj vicoj. Nur nemultaj gesamideanoj kolektigis sub nia verda standardo. Mankas multaj, ho ve, tre multaj.. Ni ne povas citi la nomojn - tro longa kaj doloriga estus la listo. Ni devus citi multajn hebreajn gesamideanojn, tiom multenombre kaj vigle partprenintojn nian pollandan esperantan movadon, ni devus citi multajn polajn samideanojn, kiuj pereis sub la bruta germana jugo.

Infanoj, kiuj lude, kapable lernis Esperanton estas for!

Belaj, junaj fraulinoj, fidele kaj diligente ornamantaj salonojn por solenaj festvesperoj kaj gaje babilantaj Esperanton dum la amuzaj vesperoj estas for!

Seriozaj idealistaj junuloj, ne sparantaj la tempdon kaj fortojn por propagando de nia afero estas for!

Malnovaj sinceraj esperantistoj, kursgvidantoj, propagandistoj, estraranoj estas for!

La mondkonataj samideanoj, eminentuloj de nia movado, kies alveno honorigis esperantajn arangojn kaj donis inspiron al novaj adeptoj estas for!

Ili estas bruligitaj en la germanaj kremaciejoj, sufokitaj de gaso, mortturmentitaj en la koncentrejoj, pafitaj de la modernaj hunoj. Nekonataj estas iliaj tomboj, indiferenta vento disblovis diversflanken cindrojn de iliaj homaj korpoj sed en niaj koroj eterne restos la sankta memoro pri niaj gemikoj, gesamideanoj, kunbatalantoj, mortigitaj de la germana barbareco.

Honorinda estu la memoro de esperantistoj, viktimoj de la germana teroro kaj furiozeco!

Honorinda estu la memoro de esperantistoj, falintaj sur batakampoj, defendante sian Patrujon kaj demokracion!

Apud la tombo de Dro L. L. Zamenhof

En la dudeknaŭa datreveno de lia morto.



Parolas reprezentanto de Varsovia Esp. Grupo S-ano I. Dratwer.

Apud la tombo de Dro L. L. Zamenhof.

Estis printempa, sunbrila tago, kiam varsovia esperantistaro kunvenis la 14-an de aprilo apud la tombo de Majstro por soleni la memoron de dudeknaŭa datreveno de lia morto. Post terura milito kaj, precipe, furioza ruinigo de hebrea tombejo flanke de hitleristaj bandoj la tombo de Majstro aspektis malagrabla: la tero estis plena da truoj, la surtombaj arboj estis en senorda stato, sed la monumento, starigita de la tutmonda esperantistaro en 1927 estis nedifektita: la tempo nur senkolorigis la oran ornamon de literoj gravuritaj sur monumento. Dank' al klopodoj de varsovia esp. Societo kaj de Hebrea Komitato la tombo estis ordigita kaj nia redaktoro kun prezidanto de varsovia societo s-ro Majewski venis pli frue en tiu solena tago por kun penikoj en la mano orumi la literojn.

La varsovia gazetaro volonte informis la publikon pri funebra solenfesto kaj tombejon plenigis la reprezentantojn de varsovia samideanaro kaj esperantema publiko. La familio Zamenhof reprezentis S-ino Wanda Zamenhof kun filo Ludviko, nepo de Majstro.

Antaŭ tombo, kovrita de floroj, la unua aperis Delegito de tutmonda esperantistaro organizita en Internacia Esperanto Ligo-sono R. Sakowicz, kiu sin turnis al kunvenintaj kun sekventaj vortoj:

Karaj samideanoj! Precize antaŭ 29 jaroj en malserena, nebula tago, en kiu ankoraŭ pafadis la armiloj de la kverelanta Eŭropo, kunvenis tie ĉi la varsovia samideanaro por honorigi homajn restaĵojn de tiu, kiu donis al malpacanta mondo „novan senton”. Tiu homo, kies lingvan geniecon devis konfesi ec liaj lingvaj kontraŭuloj, kiel famekonataj aŭtoroj de franclingva „Historio de la lingvo internacia”, tiu homo, kiun Francujo distingis per „Honora Legio” kaj dum brilaj tagoj de Universala Kongreso en Cambridge havis post sia kaleso galopantan tacmenton de milita kavalerio, tiu homo en lia privata vivo estis modesta idealisto, senlace propagandanta la ideon de paco, humaneco kaj amo. Estas nun nemultaj esperantistoj, kiuj konis persone Dron Zamenhof kaj mi estas feliĉa ke mi estas unu el ili. Mi bone memoras tiun neforgeseblan vesporen antaŭ 35 jaroj, kiam post la unua tutruslanda esperantista kongreso en Peterburgo, mi, juna studento kun alia juna oficiro-esperantisto akompanis nian Majstron en duonlumigita vagono de rapida-vagonaro ĝis unua pli granda stacio. Ni avide englutadis la sonojn de zamenhofa parolado: dum mia pli ol kvardekjara esperantista vivo mi audis multe da esperantistaj oratoroj-la unua Dro Privat, sed lingvo de dro Zamenhof estis nekomparebla: belsona, preciza, klara kaj kun bedaŭro ni adiaŭis Majstron post tutkora parolado: dum longa tempo mi konservis kiel signon de memoro lian donacon-digaredon, kiun li oferis al mi.

Tiam, same kiel nun, mi estis reprezentanto de nia plej potenca internacia organizaĵo en kies nomo hodiaŭ mi parolas: Internacia Esperanto Ligo ciam estas fidela al idealoj de nobla kreinto de nia lingvo, kiu malgraŭ morkoj kaj baroj kolektis „grandan rondon familian”. Antaŭ 29 jaroj, dum lia enterigo, kiel unu el tiuj familianoj, inter areto da civiluloj venis ankau, por honorigi la memoron de Majstro, uniformita reprezentanto de nacio, kiu post dudek kvin jaroj preparis tiel kruelan sorton por gefiloj de nobla homo.

Sed nun estas agrable konfesi, ke la „noktaj fantomoj” jam forpasis, la suno gaje brilas kaj vokas nin al la batalo pro la idealoj, pro kiuj batalis nia Majstro. Ni memoru kaj forte ripetu liajn vortojn:

Forte ni staru fratoj amataj
Pro nia sankta afero
Ni bataladu kune tenataj
Por nia bela espero.

Post tiu parolado vic-prezidanto de Varsovia Esp. Grupo s-ano I. Dratwer metis florojn sur la tombon kaj en nelonga sed elokventa parolado substrekis la necescon de komuna laboro por realigo de ideoj de nia Majstro, precipe post la mallumaj tagoj de la milito.

La lasta parolis delegito de IEL por junularo s-ano Kozłowski, kiu venis kun grupo de la plej junaj varsoviaj esperantistoj-eksonis kanto de junularo „Jen levigas ni konstruantoj de la nova mondo” kaj fine gimnaziano de la unua klaso Kryśia Krawczykówna laŭlegis la promeson de esperantista junularo sekvi la idealojn de Majstro.

Post tiu kortusa fino la kunvenintaj estis fotografitaj de s-ano Pleskaczyński. Kelkaj samideanoj decidis viziti la proksiman straton Dzika, kie staris domo en kiu logis Dro Zamenhof en la unuaj dekjaroj de nia movado, sed tio ne estis facila tasko: inter haoso de disfalintaj muroj, montoj da rubo kaj malgrandaj vojetoj, kiuj restis de iamaj grandaj domoj kaj stratoj, fine oni trovis kun malfacileco tiun ĉi lokon kie iam staris tiu ĉi domo. Oni enmetis en la rubojn verdan standardon kaj la loko estis fotografita por eterneco.

Internacia Esperanto Ligo

Se vi estos iam ajn en Londono kaj inter amasego da stratoj trovos en la centro de urbego Baker street, bone konatan al la legantoj de detektivaj aventuroj de fama Sherlock Holmes, vi nepre uzu la „metron“, kiu vin veturigos tridek kilometrojn al malgranda sublondona urbeto Rickmansworth. Se vi ne volas atendi autobuson Nr 361 kiu vin veturigos kvar kilometrojn antaŭen vi povas piediri tra bonega angla soseo kaj post tiu agrabla promenado vi antigos konatan en tuta mondo esperantista domon de Internacia Esperanto Ligo en Heronsgate, kiun antaŭ 10 jaroj malavara idealisto donacis por I. E. L.

En tiu domo laboras nia Centra Oficejo, zorge gvidata de sekretario de IEL s-ro Cecil Goldsmith. La estraron de I.E.L. prezentas Prezidanto s-ro L. Bastien, generolo de franca armeo, kiu post kvin jaroj de deviga milita silentado nun sin turnis al la esperantistaro, kiu estis dividita dum la terurega milito, meze de mortoj, de funebro, de sango. S-ro Bastien memorigas, ke samideanoj, kiuj mortis aŭ suferis por sia patrujo postlasis al ni grandan devon: daurigi ilian laboron, triumfigi nian „sanktan aferon“. Parolante pri la agado de I. E. L. dum milito s-ro Bastien citas la respondon de unu franca altrangulo, kiu estante demandita kion li faris dum malserena tempospaco de Franca Revolucio respondis simple: „mi travivis!“ Se oni demandas kion faris I. E. L. dum la estinta milito, s-ro Goldsmith rajtas fiere respondi: „mi kontentige travivis!“ Efektive, la Jarlibro de IEL aperadis regule, ankaŭ oficiala organo de IEL „Esperanto Internacia“ daurigis sian publikigon, sed nur dumonate kaj malgrandformate pro la paperporciumo. Pro manko de kontakto multaj landoj ne povis sendi siajn kotizojn, sed malgrau la malpligrandigo da membraro la mona situacio de IEL montris profiton - tio estas la sekreto de s-ro Goldsmith!

Vic - prezidanto de IEL estas s-ro E. Malmgren el Stockholmo, kiu ne bezonas prezentadon al esperantistaro, precipe pola, - lian bonfaran agadon por samideanoj, suferintaj de milito, ni bone konas: multaj el ni ricevis malavaraĵn donacojn de svedaj esperantistoj kaj eble duono da pollandaj geesperantistoj promenas en siaj urboj vestitaj laŭ sveda modo!

Sed la koro de nia Centra Oficejo estas s-ro C. Goldsmith. Lin bone konas la esperantistaro de la tuta mondo: multjara, energia gvidanto de Centra Oficejo, li atingis dum la milito neatendite bonajn rezultojn. En malgranda IEL domo kune kun siaj stabanoj, inter kiuj ni citu la nembron de Estraro s-ran A. Oliwer, li energie kaj senbrue provizas tutan mondon esperantistan per sennombraj ekzempleroj de „Esperanto Internacia“, jarlibroj, propagandiloj kaj zorgas pri pligrandigo de reto da Delegitoj kaj kelkaj el delegitoj de Polujo dank'al afableco de s-ro Goldsmith jam estas „adoptitaj“ kiel membroj-abonantoj, do, unuvorte, li estas ne nur oficiala persono en nia Ligo, sed ankaŭ bonkora onklo zorganta pri armeo da siaj verdaj genevoj!

Krom estraro, Internacia Esperanto Ligo havas konstantan Komitaton, konsistantan el 21 membroj el 13 landoj. Bedaurinde Pollando nun ne estas reprezentita.

Membraro La membraro de IEL estas dividita en kelkaj kategorioj - la plej simpla membro pagas jare cent zlotoj en pola valuto al sia delegito kaj ricevas membrokarton, jarlibron de IEL kaj servokuponaron, kiu rajtigas lin postuli servojn de Delegitoj de IEL en la tuta mondo. Membro-abonanto pagas 250 zl. kaj ricevas krom tio monatan gazeton de IEL „Esperanto Internacia“. Membro subtenanto ricevas la samon kiel MA, sed pagas pli altan kotizon 400 zl - por helpi I. E. L.

La nomojn de membroj-subtenantoj estas presataj en „Esperanto Internacia“ kaj en jarlibro, do se vi estas jam MA kaj volas eternigi vian nomon, bonvolu sendi aldone mankantan sumon. Nia ambicio postulas ke inter kelkcent da MS estu ankaŭ polaj samideanoj!

Multe pli malavara devas esti Membro-Patrono, li pagas bonvole la dekoblan MA kotizon por helpi al pli efika laboro internacia. En 1944 jaro IEL havis nur 21 patronojn.

Fine, kronon de la membraro de IEL reprezentas Dumvivaj Membroj ili pagas po /atentu !/ 10 anglaj funtoj aŭ egalvaloron en alia valuto /50.000 zl./ kaj estas dumvivaj membroj-abonantoj.

En 1945 la nombro da membroj en 39 landoj estis 8266 kompare 5386 en 1944. En Pollando en 1939 estis 253 membrojn de IEL kaj nun nur 42. Helpu al ni varbi novajn membrojn por plej potenca organizado de nia movado.

Jarlibro. - aperas en du partoj: unua, en printempo kun informoj pri Delegitoj, esp. gazetoj, enterprenoj kaj multaj aliaj aferoj, kiujn esperantistoj bezonas scii. La dua parto aperas autune kaj informas pri novaj Delegitoj, donas raportojn pri Esp. movado kaj, kutime, ian fakterminaron. Ambaŭ partoj estas senpage dissendataj al la membroj pagintaj la tutan kotizon.

Nun, kara leganto, vi jam bone ekkonis nian I. E. L., kiun vi, certe, subtenos. Do, ne forgesu sendi **t u j** kotizon por 1946 jaro laŭ:

P. K. O. Konto 1 - 1613. Roman Sakowicz. Warszawa - Okęcie, Asnyka 4.

Babilado de nia redaktoro.

Kiam mi imagis min en rolo de la redaktoro mi vidis min sidanta apud eleganta tablo sur kiu kulis multnombraj leteroj de senpaciencaj legantoj, demandantaj malkviete: „kiam vi aperigos vian tiel longe atendatan, bonegan gazeton“? Mi prenas la telefonaudilon kaj ordonas: „Sro Presisto, bonvolu plej rapide presi mian gazeton. Kiom da ekzempleroj? Nu, eble dekmil sufcios!“ Tiel aspektis la redaktora laboro en mia revo. Sed nun, post duonjara agado, kiam mi jam havas eblecon eldoni ne gazeton sed nur modestan bultenon kaj kiam mi trastudis ciujn presejojn ne nur en Warszawa sed en aliaj urboj-mi vidas ke la redaktora pano /sen butero/ ne estas tiom agrabla.

Kiam mi decidis aperigi esperantan gazeton ne estis ebla trovi en ruinigita Warszawa ian presejon kiu volus presi nian malgrandan gazeton; la presejoj estis supersutitaj da mendoj. Fjine mi trovis unu, kiu konsentis sed estis nova baro: en tuta Warszawa mankis esp. supersignoj por linotipoj. Ni skribis ec Svedujon por ricevi ilin sed venis informo ke svedoj mendis mem en Ameriko-la vojo por ni tro malproksima-

Intertempe la prezroj terure altigis kaj kiam nia redakcia konsilanto, sano Dratwer, post longaj intertraktadoj kun presejo anoncis al mi la laste postulitan ciferon, mi preskau svenis. Mi diras „preskau“, car mi timis sveni tute-en la grupa kunvenejo, kie ni parolis mankis segoj, do mi riskis sveni plankon.

La situacio aspektis senespere. Sed tute okaze en mia suburbo mi malkovris malgrandan mankompostatan presejon, kiu volonte konsentis presi mian bultenon „lau moderaj prezroj“. Sed-nova baro: mankas la supersignojn! Tiam mi decidis ke ni eldonu la bultenon sen ili: mi opiniis ke niaj legantoj pardonos ruinigitan urbon (kaj redaktoron!).

Do mi ordonis al niaj kunlaborantoj, (do, al mi mem kaj sro Dratwer) ke oni evitu vortojn kun supersignoj. Mi mem, kiel disciplinema homo obeis, sed s-ano Dratwer, kiu nuntempe multe „maldekstrigis“ kaj lau onidiroj estas sub influo de s-ano Zawada pri kiu oni sekrete flustras ke li estas „maldekstra anarhisto“, do s-ano Dratwer protestis: „Sen supersignoj? Eble vi volus ke mi skribu artikolon lau antaumilita projekto de „Heroldo de Esperanto“-ia tutan kun la vortoj, komencantaj per unu sama litero?“

Finfine s-ano Dratwer prezentis al mi la tradukon de „Kanto pri Warszawa“ kie lokigis ruze multajn apostrofojn, dank' al kio mi havis plendon de presisto: „Sro Redaktoro, vi diris ke en via esperanto la vortoj finigas per „o“ au „a“ sed nenion diris pri komoj. Sed via „Kanto“ havis tion da komoj ke mi devis pruntepreni ilin en alia presejo“. Mi respondis, ke en Esperanto ni havas diversajn literaturajn direktojn; la tradukisto apartenas al la anarhista sekto, kiu opinias ke litero „o“ estas tro „reakcia“, car tro ronda, kaj oni devas anstataui gin per abrupta „revolucia“ apostrofo.

Bedaurinde la presisto ripetis miajn vortojn al sro Dratwer kaj baldau en literaturaj esperantaj rondoj de Warszawa rondiris stulta famo ke inter mi kaj sano Dratwer la interrilatoj tiel estas strecaj ke nur manko da mono por aceto de pistoloj prokrastas la duelon. Mi devas oficiale komuniki ke en tiu tuta historio vera estas nur unu fakto: jes, ni ne havis monon!

Napoleono diris ke por arango de milito li devas havi nur tri objektojn: mono kaj mono kaj mono. Por ni suticus nur unu el ili sed ec unu estis malfacile trovebla.

Kaj jen venis atendata helpo: antau cio (vi tion jam divenis, kara leganto!) „onklo el Ameriko“! Tiufoje, esperantista onklo-konata Usona longjara propagandisto kaj aganto por nia ideo, sano S. Kluowski, kiu helpis al nia redaktoro savi la sanstaton, necesan por redaktado de gazeto.

Simpatian zorgon ni havis de s-ino Maria (ni modeste evitu la familnomon, car sia edzo kaj edzino de nia redaktoro estas iom jaluzemaj!)

Sed la plej firman apogon nia bulteno havis flanke de simpatianta kun nia movado Gazetara Direkcio de Ministrejo de Eksteraj Aferoj. Eble vi dankos gin.

Ni ne forgesu ankau centojn da niaj legantoj kiuj malavare helpos nin, car ili sendube volus ke nia dua numero baldau aperu.

Al ili ciuj mi sendas la plej sincerajn dankojn kaj rememoras ke mia konto de P.K.O. estas: 1-1613. Warszawa-Okęcie, Roman Sakowicz. **La redaktoro.**

Anonco. Ni posedas kelkajn esp. librojn - 100 zl. unu kaj povas vendi ian ajn kvanton da respondkuponoj 7 zl. unu, plus 6 zl. afranko.

Redaktor-wydawca R. Sakowicz W-wa-Okęcie, Asnyka 4.

Druk. K. Stępień W-wa-Okęcie, Reymonta 3. B-08536

